



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O


Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1997 — 3

(JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO)

vi povos legi pri...



KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
La Orkadaj Insuloj (Irene Bennett)	3-5
La Kvizo de B. Golden	6-7
Premio Onisaburo Deguchi	8
Kon Tiki (Thor Heyerdahl)	9-11
Fabeloj (Prévert, tr. S. Boniol)	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

EL GRESILLON

**ĜIS VENONTA JUNIO
GRAVAJ, MULTEKOSTAJ
LABOROJ NEPRE NECESAJ
ESTOS FARITAJ EN LA
KASTELO.
ĈU VI POVAS FINANCE
HELPI ?**

VIAJN ĈEKOJN SENDU AL :GRESILLON
"FONDUSO SEKURECO", F-49150 BAUGE.

"Mi iras al Adelajdo; mia unua longa vojaĝo. La vojaĝo de mia vivo !", diris, ĝoje, Marie-Josèphe Berger. Ŝiaj geamikoj, kiuj salutis ŝin je ŝia foriro de Grésillon, komence de julio lasta, ne revidis ŝin. Ŝi mortis en Adelajdo.

Multaj konis ŝin de longe la kurs-gvidantinonde la junia studperiodo. Ŝi mem forĝis, fabrikis, iom post iom, sian kurs-metodon. Ŝi mem "fabrikis" sian kurso-materialon. Sukcese.

Adiaŭ Marie-Josèphe. Esperanto helpis vin elteni la unuajn jarojn de via emeritiĝo, sed vi redonis multon al Esperanto poste.

Frédéric Thébaud mortis, fine de septembro subite, en sia ĝardeno. Jam de 1951 li helpis Grésillon iri siajn unuajn paŝojn. Komitatano de GEE li sekvis Micard kun kelkaj aliaj, sur la nova vojo "Esperantista Kulturdomo". Dum 15 jaroj, ĉiusomere, kun la familio, li restadis en Grésillon, kie li gvidis kursojn, zorgis pri kulturaj aranĝoj.

Post sia emeritiĝo, en la urbeto, Guérande, kie li retiriĝis, li denove instruis la internacian lingvon.

Ĉiuj gesamideanoj, kiuj konis lin, lian egalanimecon, lian spritecon, lastfoje salutas lin kaj diras al liaj familianoj, al Joël kaj Luc: amikon kiel Frédéric oni ne forgesas.

ESPERANTO TRA LA MONDO

LA UK 98 EN MONTPELLIER: 41 jaroj post la Universala Kongreso en Marseille, la plej grava manifestacio revenas en Francion. La 83-a UK okazos en la moderna konstruaĵo "Corum" en Montpellier de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998. De nun oni povas havi afiŝojn, la unuan bultenon kaj aligilojn. La kasistino de la kongreso estas Gisela Passarella, 10 Impasse Ecole-J. Ferry, 34290 Servian. La Loka Kongresa Komitato bezonas la helpo de volontuloj por la diversaj servoj: loĝado, kongresejoj, bonveniga servo, infankongreseto, ĝicetoj, turismo. Rilati kun Annick Tora, rĉs. des Puns, CD 17, appt. 13, 1577 avenue de Maurin, 34 000 Montpellier.

La responsulo por la kontaktoj kun la informaj medioj estas Bruno Flochon, 6C, av. de l'Hippodrome, 69890 La Tour-de-Salvagny, tel. 04-78-48-00-40.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA: la 71-a kongreso de SAT okazos en Odeso, en Ukrainio, ĉe la Nigra Maro. Informas: SAT, 67 av. Gambetta, 75020 Paris.

POST LA EŬROPA KONGRESO: Lastan Pentekoston Esperanto Eŭropa kongresis kun 400 partoprenantoj el 22 landoj. La temo de la kongreso estis: "Eŭropo - kien vi?". Eŭropa Esperanto-Unio ricevis novan statuton, subskribitan dum la solena fermo de la ĉeestantaj landaj reprezentantoj. Espereble, ĝi sukcesos esti aŭdata de la oficialaj eŭropaj instancoj (?) La venonta Eŭropa Kongreso okazos en la jaro 2000 en Oostende (Belgio).

INTER SINDIKATANOJ: Pro la estiĝo de multaj sociaj problemoj sine de la Eŭropa Unuiĝo - interalie - estus bone provi diskonigi esperanton inter la sindikatanoj kaj salajruloj ĝenerale, de la diversaj landoj. Lasttempe, grupeto de belgaj sindikatanoj lernis esperanton kaj nun bezonas kontakton kun kamaradoj de aliaj landoj. Se vi estas koncernata, skribu al la provizora adreso ĉe Germain Pirlot, Steenbakkerstraat 21, B-8400, Oostende, Belgio.

INTER FERVOJISTOJ: Ĉi jare, la internacia kongreso de esperantistaj fervojistoj okazis en Košice (Slovakio). La sekvonta okazos en Aalborg (Danio) de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1998.

La franca asocio (F.F.E.A.), 1bis rue d'Athènes, 75009, Paris, povas liveri la

novan fervojan terminaron, francan-esperantan / esperantan-francan - libro bindita (360 paĝoj)

JARFINA FESTIVALO EN GERMANIO: Kiel kutime, inter la 27-a de decembro kaj la 3-a de januaro, okazos en Germanio la Internacia Festivalo. Tiun jaron la historia urbo Trier akceptos la junajn familiojn kaj la personojninter 25 kaj 55 jaroj. En la programo: interesaj prelegoj, promenadoj, filmoj, fakultativa ekskurso al Luksemburgio kaj la tradicia silvestra balo. Kontakto: Internacia Festivalo, Hans-Dieter Platz, postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio.

ĈE LA BLINDAJ ESPERANTISTOJ: Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj proponis al svisa specialista organizaĵo aranĝi konferencon pri la problemoj kaŭzitaj de la aplikado de komputiloj por brajla skribo, kun la partopreno de specialistoj. LIBE promesis respondeci pri la interpretado por la aldone de esperanto al la angla, franca kaj germana lingvoj. La konferenco sukcese okazis kun la partopreno de 60 specialistoj el 13 landoj inter kiuj estis dekludo da esperantistoj, dum februaro, en Solsana/Saanan (Svisio).

"HERNANI" EN ESPERANTO: En la serio de la specialaj literaturaj numeroj "Antologieto de la franca literaturo" de "Franca Esperantisto", aperis lasttempe la traduko de "Hernani", la teatra drama verko de Victor Hugo. La tradukisto estas Georges Lagrange, aŭtoro de tri originalaj romanoj en esperanto kaj tradukisto de aliaj teatraĵoj. Li ankaŭ aktive zorgas pri la esperanto-cen,tro "La Kvinpetalo".

KASEDOJ KAJ DISKOJ: Esperanto-Rok-Gazeto, kiu publikigis novan numeron 54-paĝan de "Rok-Gazeto", povas sendi al vi la novan pridiskajn kaj kasedan katalogon "Vinilkosmo". Vi povas peti ĝin - eĉ plurajn ekzemplerojn - por la junaj aŭ interesataj membroj de via esperanto-centro, skribante al: "Eurokka", 31450 Donneville, Francio. Prefereble aldonu afrankan koston.

NOVA. LIBRO " Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj". La travivaĵoj de la bonega esperantista verkisto Trevor Steele en diversaj landoj.

LA ORKADAJ INSULOJ

IRENE BENNETT

Orkado (Orkney) estas insularo, kiu entute ampleksas sesdek sep insulojn situantajn apud la norda marbordo de Skotlando, trans la markolo nomita Pentland Firth. La granda insulo, meze de la insularo, nomiĝas Pomona, sed la orkadanoj ĉiam nomas ĝin la orkadan ĉeflandon. Sur tiu insulo troviĝas tri kvaronoj el la 20 000 enloĝantoj kaj la duono de tiuj loĝas en la ĉefurbo, Kirkwall kaj la ekstera ĉirkaŭaĵo nomita Sankta Ola. La ĉefurbo kaj Sankta Ola, kun malpli ol okmil loĝantoj, estas nur urbeto. La cetera kvarono, t.e. la pli malpli kvin mil, ne loĝantaj sur la ĉefinsulo, disiĝas sur deksep el la aliaj insuletoj, en kamparaj bienoj aŭ vilaĝetoj.

La granda plimulto de la tereno estas ebena aŭ onda ebenaĵo kun lagoj kaj malmultaj montetoj, krom ĉe la dua pli granda suda insulo, Hoy, kies nomo signifas "la altan insulon". La insularo ambaŭflankas latitudon 59°, ne malproksime de la Arka Cirklo. Tamen la vintroj ne estas severe malvarmaj, ĉar la varma marfluo devenanta de la Golfo de Meksikio kaj transiranta la Atlantikon, nordoriente preterpasas la insulajn marbordojn kaj mildigas la vintran temperaturon. Tre malofta vidiĝas neĝo, sed preskaŭ konstante ventas. Somere ne multe varmas ĉar freŝa aero ĉiam abundas; la tersurfaco restas bele verda kaj la lagoj kaj ĉirkaŭantaj maroj intense bluaj je sunaj tagoj. Orkadanoj rajtas fieri pri pura viv-medio.

La orkadaj insuloj atingeblas aŭ per aviadilo aŭ per ŝipo. Aviadile oni povas flugi inter la skotaj flughavenoj Edinburgo, Glasgovo, Aberdeen, Inverness aŭ Wick kaj la flughaveno en la apudeco de Kirkwall. Ŝipe, pramservo haveblas almenaŭ unu fojon ĉiutage dum la tuta jaro, eĉ plurfoje krom dum la vintro. Komforta aŭtoportanta ŝipo transiras la markolon de Skrabster, ĉe la norda marbordo de Skotlando, ĝis la orkada haveno Stromness, preterpasante la faman homforman rokon starantan en la maro, disigitan de la klifoj, nomita "la Maljunulo de Hoy". Aldone, inter la mezo de majo kaj la mezo de septembro, pasaĝ-

eroj povas transiri de John O'Groats al Burwick vojaĝante dum kvardek kvin minutoj. Inter la aliaj loĝataj insuloj sep kromaj ŝipoj transportas homojn, bestojn, veturilojn kaj varojn. Haveblas ankaŭ aviadilaj servoj inter la ĉefaj insuloj; eĉ okazas inter Westray kaj Papa Westray la plej mallonga flugo ie ajn en la mondo: ĝi daŭras du minutojn!

La unuan kronikon pri historiaj eventoj oni ŝuldas al islanda literaturisto, kiu verkis "La Orkneyinga Saga", per kiu oni ekscias pri la regantoj en la insularo ekde la naŭa jarcento. Nu, pro la longa fjord-forma marbordo de Norvegio okazis ke la norvegoj fruepoke ellernis la navigad-arton kaj ekentreprenis vojaĝojn tra la norda maro okcidenten. La orkadaj insuloj oportune lokiĝis survoje dum tiaj esplor-vojaĝoj. Sekve, komercado ekprosperis, la norvegoj koloniis la insulojn kaj la denaskaj orkadanoj trovis sin sub la regado de grafoj nomitaj de la reĝo de Norvegio. Loknomoj, ĉie en Orkado atestas pri la influo de tiuj fruepokaj enmigrintaj norvegaj ŝipanoj. Kirkuvagr, la nuntempa Kirkwall, menciigis skribite unue jam en la jaro 1046.

Kirkwall situas ĉe la norda marbordo de la ĉeflando, tie kie la granda insulo fariĝas istmo mallarĝa de nur proksimume tri kilometroj inter la norda maro enhavanta la nordajn orkadajn insulojn kaj la suda rondecata mareto ĉirkaŭata de la sudaj orkadaj insuloj, kiu nomiĝas "Scapa Flow". Al unu el tiuj potencaj norvegaj grafoj regantaj dum la frua dekdua jarcento, Kirkwall ŝuldas sian belan historiaran katedralon, kiu nuntempe restas, kiel unu el la du plej bele konservitaj mezepokaj katedraloj en la tuta lando Britio.

Tiuj norvegaj grafoj poste superis en bataloj sur la skota ĉeflando kaj plivastigis siajn terposedaĵojn tie, en la norda parto de Skotlando. Kelkaj ekligis sin al potencaj skotaj familioj, kaj post nelonge la reĝo de Norvegio rajtigis al Skotoj la administradon de orkadaj graflandoj. Ĝis la mezo de la kvindeka jarcento la plej sukcesaj grafoj estis tiuj, kiuj ellernis la arton ekvilibrigi la potencon inter Norvegio kaj Skotlando.

Nu, en la jaro 1349 okazis terure mortiga epidemio nomita la "Nigra Morto". Pro tio enloĝantoj en ambaŭ reĝlandoj

multe suferadis sed kaze de Norvegio, la ruinigo multege pli superis: mortis inter triono kaj duono de la tiea loĝantaro, kaj la ekonomia kolapso en Norvegio estis tia, ke, fine, dana reĝo elektigis kiel reganto de tiu lando kaj de ĝiaj foraj terposedaĵoj. Tiu-tempe la grafoj en Orkado fariĝis pli potencaj kaj pli kaj pli skotdevenaj, ĝis la turnopunkta jaro 1468. Tiam, pro politikaj motivoj estis oportune edzigi la filon de la skota reĝo kun la filino de la dana reĝo. Tamen post konsento pri la doto, la dana reĝo ne povis havigi al si la monsumon pagendan kaj provizore transdonis siajn orkadajn posedaĵojn kaj rajtojn al la reĝo de Skotlando. Tiu ĉi finskotigis la regadon de la orkadaj insuloj kaj de la eklezio, kies episkopoj, jam skotoj, de tiam dependis de skota diocezo. La Orkadanoj, tamen ĝis nun fieras pri sia fruepoka asocio kun Norvegio kaj konservas amikajn ligojn kun la Norvegoj.

La rondeca mareto ĉirkaŭata de insuloj supre menciita, Scapa Flow (Skapa Flo), ĉiam grave rolis en la historia evoluo de Orkado kaj en la sorto de la insulanoj. La brita mararmeo jam de la deknaŭa jarcento profitis de ĝia bonega strategia situo kaj de la avantaĝoj de tiel grandega haveno. Sekve, dum la unua kaj la dua mondmilitoj Scapa Flow utilis, kiel la restadejo kaj ekzercadejo de la brita milit-ŝiparo. Plie, ekde la fino de la unua mondmilito Scapa Flow krome rolis, kiel la restadejo por la kaptita germana ŝiparo. Sendube normala dumilita evento, sed tute nenormalaj estis la sekvaj okazintaĵoj, kiuj baldaŭ ĝin famigis: la 21-an de junio 1919 Admiralo Ludwig von Reuter, respondeca germana komandanto pri la ŝiparo, okazigis nekredeblan spektaklan dramon, kiam li ordonis la dronsabotadon de la sepdek kvar ŝipoj tie ankritaj. Poste, dum la ekonomie malfacilaj intermilitaj jaroj tiu ŝipa sepultejo fariĝis bonvena laborloko. Ekfunkciis postsavadaĵ kaj forigaj projektoj, kiuj daŭris ĝis la interrompiga eksplodo de la dua mondmilito. Feliĉe, tamen, ĝis nun daŭre kuŝas sep el tiuj ŝipoj, kiuj provizas allogan plonĝejon por plonĝamantoj tien alvenantaj el multaj landoj. Ŝajnas ke vidindaj estas ne nur la restaĵoj de la ŝippereajĵoj mem, sed ankaŭ la konkuloj kaj floraj alkroĉaĵoj, kiuj, ĝis nun, kreis novan interesan naturmedion. Interese, eĉ surprize estas, ke ĉi-jare entreprenemuloj komencis ekspluatadon de tiu kroma turista allogaĵo;

ili disponigas al interesatoj boaton ekipitan per plej moderna televida rimedo. Dank'al ĝi spektblas tiuj subakvaj vidindaĵoj malkaŝitaj al ili dum ili sidas sekaj, komfortaj kaj sekuraj.

La porŝipaj enirejoj al Scapa Flow inter la ĉirkaŭantaj insuloj nombris naŭ. Inter ili la plej oportune traireblaj el la Norda Maro estis la mallarĝaj markoloj situantaj oriente inter la ĉefinsulo kaj la pli sudaj insuletoj. Tial celante blokadon kontraŭ la enirado de malamikaj ŝipoj oni sinkigis, trans tiuj markoloj, aron da eluzitaj forĵetebaj ŝipoj, entute tridek ses. Kiel defendadoj tute bone efikis tiuj dum la unua mondmilito, sed daŭra fido je same estonteca efiko malpraviĝis. Okazis katastrofa evento la 24-an de oktobro 1939 t.e. preskaŭ tuj post eksplodo de la dua mondmilito, jene. Iu Gunter Prien, aŭdaca komandanto de la germana submara ŝipo U47 brile sukcesis manovri sian ŝipon inter la blokantaj obstakloj kaj sufiĉe alproksimiĝinte al la ununura brita militŝipo tiutempe deĵoranta tie, li ordonis elpafigi de kvar torpedoj, kiuj translokigis la "Reĝa Kverko"-n (Royal Oak) kune kun 824 el la ŝipanoj al la fundo de la maro. Tion farinte, sen iu ajn ĝeno, li returne ekfuĝis kaj efektive eskapis sendifekta laŭ la sama vojo. Fariĝis urĝa do efektivigo de nepre fidinda venko de la problemo. La kvar orientaj markoloj estos nuligitaj per kunigo de la ĉeflando kaj de la kvar koncernaj sinsekvaj insuloj. Tiu giganta inĝeniera entrepreno, kompreneble tuj farenda, malgraŭ la aktualaj malfavoraj dumilitaj cirkonstancoj, okazigis kelkajn interesajn sekojn. Ne mankis inĝeniera scio aŭ teknologiaj ebloj, nek loke havebla fontmaterialo por la konstruado, tamen, pro la tutlanda mobilizado de la britaj civitanoj al la armeaj kaj aliaj gravaj servoj, ja levigis problemoj pri la manlaboro bezonata. Kiel solvo por tiu problemoj, la tiama brita ĉefministro, Winston Churchill translokigis al Orkado milon da italaj militkaptitoj por refortigi la ŝrumpitan laboristaron. Nepre menciindas tiu okazintaĵo ĉar, dank'al la diversfakaj lertoj, la eltrovemo kaj la religia spirito de la enloĝantoj en la militkaptita barakaro numero 60 sur la insuleto Lamb Holm, la nunaj orkadanoj fieras kaj zorgas pri belega vizitinda itala kapeleto, kiu nepre allogas ĉiujn vizitantojn al la orkadaj insuloj. Plia rezulto de tiu dumilita entrepreno estas kvar interinsulaj solidaj bariloj, kiuj disigas

la Nordan Maron disde Scapa Flow, forigante la antaŭajn kvar markolojn; la digvojoj supre starigitaj estis tiel konstruitaj, ke ili ligas la ĉefinsulon kaj kvar el la iamaj insuloj. Tamen, oni daŭre aludas al ili kiel la "sudaj insuloj".

Krom historiaj vidindaĵoj jam menciitaj, eĉ pli allogas la okulfrapaj monumentoj starigitaj de prahomoj el la neolitika epoko. Mirinde konservita ŝtonepoka vilaĝo nomita Skara Brae, loĝata antaŭ 5 000 jaroj, superas iujn ajn tiaĵojn konatajn en tuta Eŭropo. La ĝisnuna ekzisto de tiu ĉi ŝuldiĝas al la agado de la apuda Atlantika Maro, kies potencaj ondoj per sablo enterigis ĝin en prastato ĝis kiam ŝtormego okazinta en la jaro 1850, malkovrigis surprizegan mirindaĵon. Same antikva estas ankaŭ okulfrapa druida ŝtona cirklo farita el grandegaj unuopaj ŝtonaj platoj, iuj starante altaj ĝis kvar metroj kaj duono. Restas enigmo, kiel niaj prahistoriaj antaŭuloj tie loĝantaj tri mil jarojn antaŭ Kristo scipovis transporti kaj starigi tiujn menhirojn egaldistance en perfekta cirklo 103-metrojn diametra. Vidigas nuntempe la plimulto el ili: el la sesdek pratempaj menhiroj 36 restas ankoraŭ starantaj kaj tri faligitaj. Same antikva kaj miriga estas la nekredeble bele strukturita neolitika tombejo sub herba monteto konata, kiel Maeshowe. Iu monumento montras ankaŭ saman precizecon: tiuj laborantoj de antaŭ 5 000 jaroj kapablis konstrui ĝin tiel, ke la sunsubiraj radioj, la 21-an de decembro, la vintran solsticon, brilas tra la mallarĝa tombeja pasejo kaj luminas la foran orientan muron de la interna ĉambro. Tiaj arkeologiaj trezoroj kaj postaj fruepokaj mirindaĵoj troviĝas multloke sur la insuloj.

La orkada naturmedio allogas vizitantojn, kiuj havas aliajn fakajn interesojn krom la plonĝado jam menciita. Por birdamantoj viziteblas terenoj rezervitaj por enmigro kaj restado de multnombraj specoj de birdoj, precipe marbirdoj, kiuj kolonias la marbordajn klifojn. Notinde inter tiuj troviĝas buntaj interesokaptaj fraterkuloj. Krome fiŝkaptamantoj celantaj hoki precipe trutojn trovas kvazaŭ-paradizon ĉe orkadaj lagoj. Nemalofte okazas, ke homoj feriantaj en Orkado spertas kvazaŭ sorĉan influon tiel forte, ke hejmenreveninte, estonta celo ilia estas forlasi la hejmurbon por translokiĝi

al Orkado, kiel eble plej baldaŭ. Tamen, foje, post realigo de tia revo, izoleco for de la familiaĵoj aŭ amikaro, aŭ manko de antaŭaj urbaj traviaĵoj reirigas kelkajn.

Ĝis la komenco de la sepdekaj jaroj, dum pli ol jarcento, normale okazis elmigrado de la denaskaj orkadanoj, kaj pro tio la nombro da enloĝantoj daŭre malkreskis. Tamen, dum la lastaj tri jardekoj okazas la kontraŭa fenomeno. Evidentiĝas senĉesa enmigro, kaj pro tio ke nuntempe oni povas komforte vivteni sin kaj interese okupiĝi, elmigro en la nuno ne forlogas la tieajn naskiĝintojn kiel antaŭe, krom por studado en kolegioj aŭ universitatoj. Jam de fruaj jarcentoj disponeblas al infanoj notinde favoraj edukaj eblecoj ĉe bazaj lernejoj en ĉiuj paroĥoj kaj sur ĉiu insulo loĝata, kaj du laŭdindaj gimnazioj provizas la altgradan studnivelon kune kun loĝejoj. Oni ankaŭ aranĝas senpagajn vojaĝajn bezonojn de lernantoj el la foraj insuloj. La studnivelo atingita de la lernejoj tre favore kompareblas kun tiu en la urboj de la skota ĉeflando. Postgimnazia studado ĝis antaŭ nelonge ne okazis sur la insuloj; sed nuntempe funkcias nove starigita Orkada Kolegio, kiu jam fariĝis kerno de la estonta orkada branĉo de la disvolviĝanta Universitato por la Altlandoj kaj Insuloj (Highlands and Islands) funkcia per teknologie plej modernaj instrumentadoj.

La ŝtata sanservo en Orkado funkcias tre kontentige por loĝantoj, kiuj troviĝas ie ajn sur la insularo. Kaze de urĝa bezono aerambulanco ĉiam pretas, kaj pacientoj, kies traktado postulas lertecon de fakuloj, aŭ ekipaĵonsurloke nehaveblan, translokiĝas aviadile al hospitalo en Aberdeĉen sur la skota ĉeflando sen iu ajn ĝeĥo. Maldensa loĝateco multe favoras akuratan senĝenan traktadon pri malsano.

(daŭrigota)



PRI KVIN VIRINOJ EN VERDAJ VESTOJ

Tiu ĉi kvizo konsistas el kvin vortopotretoj de virinoj. Ili ne estas esperantistinoj, sed ili estas bone konataj al legemuloj en Esperantujo. Kiom da ili vi povas senvaligi surbaze de la priskriboj en la sekvaj citaĵoj?

1- "La knabino je la unua rigardo ne faris je Petronius grandan impreson. Ŝi ŝajnis al li tro maldika. Sed de la momento, kiam li rigardis ŝin pli proksime en la "triclinium", li ekpensis, ke tamen tiel povas aspekti Aŭroro, kaj, kiel spertulo, li ekkomprenis, ke estas en ŝi io eksterordinara. Ĉion li rimarkis kaj ĉion li taksis: la vizaĝon rozkoloran kaj klaran, kaj la freŝan buŝon, kvazaŭ pretan al kiso, kaj la okulojn, blujajn kiel mara lazuro, kaj la alabastran blankecon de la frunto, kaj la abundon de la malhelaj haroj, trabrilantaj sur bukloj la koloron de sukceso aŭ de korinta kupro - kaj la facilan kolon, kaj la "dian" deklivecon de la ŝultroj, kaj la tutan figuron flekseman, gracian, junan per la juneco de majo kaj de ĵus-ekflorintaj floroj. Vekiĝis en li artisto kaj adoranto de belo, kiu eksentis, ke sub statuo de tiu ĉi knabino oni povus subskribi "printempo".

2- "La sekvantan tagon, iom antaŭ la reveno de la ĉasistoj, kiam fraŭlino Lydia, post promenado sur la marbordo, reiris al la gastejo kun sia ĉambristino, ŝi rimarkis nigrevestitan junan virinon, rajdantan sur malgranda sed vigla ĉevaleto, kiu eniris la urbon. Post ŝi sekvis, sur alia ĉevalo, kamparano kun jako el bruna drapo truita ĉe la kubuto, kun ledobotelo ŝultrozono, kaj pistolo en sia zono; en sia mano li tenis pafilon, kies kolbo kuŝis en ledopoŝo firmilgita al la selligno; mallongvorte, ti estis kostumita tute kiel melodrama bandito, aŭ korsika burĝulo dumvojaĝe. La rimarkinda beleco de la virino altiris la atenton de fraŭlino Lydia. Ŝi aspektis proksimume dudekjara. Ŝi estis granda, blanka, kun malhelbluaj okuloj, roza buŝo,

emajlaj dentoj. En ŝia mieno estis legeblaj kune fiereco, maltrankvilo, malĝojo. Surkape ŝi portis tiun vualon el nigra silko nomata "mezzaro", kiun la Ĝenovanoj enkondukis en Korsikon, kaj kiu tiel bone konvenas virinojn. Longaj plektaĵoj de kaŝtankoloraj haroj kuŝis kvazaŭ turbano ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝia kostumo estis pura sed plej simpla."

3- "Eksciinte, ke la sinjoro vokas ŝin, F-- forte ektimis; ŝi iris tamen kun la patrino. Nikolao Petroviĉ kondukis ŝin al la fenestro kaj prenis ŝian kapon per ambaŭ manoj. Esplorinte bone ŝian okulon, ruĝan de la inflamo, li ordonis fari kompresojn, kaj mem preparis la medikamenton, kaj disŝirinte en pecojn sian naztukon, montris kiel oni devas meti ilin. F-- atente aŭskultis lin kaj kiam li finis, ŝi volis foriri. "Kisu la manon de la sinjoro, malsaĝa infano!" diris al ŝi Arina. Nikolao Petroviĉ ne donis al ŝi la manon, kaj konfuzita mem kisis ŝian klinitan kapon je la hardisigo. La okulo de F-- baldaŭ resaniĝis sed la impresoj farita de ŝi je Nikolao Petroviĉ malaperis ne baldaŭ. Li senĉese vidis spirite ĉi tiun puran, delikatan, time levitan vizaĝon; li sentis sub siaj manoj ŝiajn molajn harojn, vidis ŝiajn senpekajn lipojn malfermitajn, de post kiuj brilis en la radioj de l'suno ŝiaj malsekaj, perlaĵ dentoj. Li komencis tre atente rigardi ŝin en la preĝejo, penis plej ofte ekparoli kun ŝi."

4- "Tia, kia (li) nun vidis ŝin, veturante hejmen de karbotransportado en la arbaroj, kun fulgaj manoj kaj argila pipo en la buŝo, vestita per mallonga, sensubŝtofa ŝafpelto kaj strikolora, hejmteksita lanjupo, kun krudaj ŝuoj sur la piedoj kaj tranĉilingo ĉe la brusto, kun grizaj haroj, starantaj supren super maljuna bela vizaĝo, tia ŝi milfoje aperis al li en la priskriboj!...

Severa kaj taŭga sinjorino ŝi estas... Ŝi portas unu kaj duonan hektolitron da sekalo sur siaj larĝaj ŝultroj. Ŝi akompanas la ferŝtonan transporton de la mineja regiono sur la longa vojo al Ekeby. Kiel transportisto, ŝi dormas sur fojneja planko kun sako sub la kapo. En la vintro ŝi povas gardi karbigstakon, en la somero akompani flostrunkaron suden sur Löven. Aplomba sinjorino ŝi estas. Ŝi blasfemas, kiel stratknabo kaj, kiel reĝo, regas siajn sep uzinojn kaj la bienojn de la najbaroj, regas

sian propran paroĥon kaj la najbarajn, jes, la tutan belan Vermlandon."

5- "Sur la perono staris juna virino en funebra vesto kun tre pala vizaĝo. Egale pala kaj ankaŭ funebre vestita kvarjara knabineto alkroĉiĝis al ŝiaj manoj, kiuj, kvankam ne perdinte sian forton, pendis tamen velke, donante al la figuro de la virino la eksterajn de granda malĝojo kaj sufero..."

... Sed la juna patrino ne dormis; en sia funebra vesto, kun disliberigitaj nigraj bukloj, kun vizaĝo apogita sur la manplato, ŝi sidis senmove kontraŭ la estingiĝinta fajrejo kaj meditis. Komence mordanta doloro faldis ŝian blankan frunton en kelke da profundaj sulkoj, la okuloj pleniĝis je larmoj, la brusto leviĝadis per malfacilaj ĝemoj. Sed post iom da tempo ŝi ekskuis la kapon, kvazaŭ ŝi volus forpeli la amason da kordoloroj kaj timoj, kiuj ŝin sieĝis, rektigis la talion kaj iris mallaŭte: "Nova vivo!"...

... Ĉu tiu juna, bela virino kun la gracia talio, la blankaj manoj kaj silkecaj nigraj haroj, dense ĉirkaŭantaj la belforman kapon, posedis ian forton de akirado? Ĉu el sia estinteco ŝi elportis ion, el kio ŝi povus krei estontecon? Ŝi meditis pri tio, sidante sur malalta ligna seĝeto antaŭ la ardantaj karboj de la kameno. Ŝiaj okuloj, kun esprimo de profunda amo, estis fiksitaj sur la vizaĝeto de la infano, kiu trankvile dormis sur la blankaj kusenoj...

(Rimarko: Neniuj modifoj estis faritaj en la lingvouzo de la tradukintoj.)

RESPONDOJ:

1- Ligia aŭ Callina, filino de la barbara liga popolo, kiu estis sendita al Romo de sia patro, kiel garantiulino. En "Quo Vadis" Henryk Sienkiewicz (1846-1916), la plej populara romanverkisto kaj Nobel-premiito, priskribas la vivon de la fruaj kristanoj en Romo dum la regado de imperiestro Nero. Lidia Zamenhof, filino de d-ro L.L. Zamenhof, tradukis la romanon en Esperanton en 1933.

2- Colomba, "kruela heroino, la enkarnigo de la ĝismorta korsika venĝemo"

donas sian nomon al "Colomba" verkita de Prosper Mérimée (1803-1870), franca majstro de la novelo kaj mallonga rakonto. La romano temas pri tradicia familia kverelo en Korsikio dum la pasinta jarcento. J. Beau faris la tradukon el la franca originalo en 1938.

3- Feodosia Nikolavna aŭ Feniĉka, kunulino kaj poste la dua edzino de Nikolao Petroviĉ Kirsanov. Ili rolas en " Patroj kaj Filoj " de Ivan Turgenev (1818-1883). Ĝi estas majstroverko en la ĝenro de la socia romano kaj reliefigas ne nur la antagonismon inter du generacioj, sed ankaŭ inter du mondoj kaj vidmanieroj en la 19-jarcenta Rusio. Kazimierz Bein (Kabe) elrusigis la verkon en 1909.

4- Margareta Celsing aŭ majoredzino Samzelius. Ŝi aperas kiel la "majorino" sur la paĝoj de "Gösta Berling", ĉefverko de la sveda Nobel-premiito Selma Lagerlöf (1858-1940). La aŭtorino rakontas la aventurojn de la eksigita pastro Gösta Berling, kaj la malriĉaj, diboĉantaj kavaliroj de la bieno Ekeby en Vermlando, sia hejmmregiono. Stellan Engholm esperantigis la romanon en 1934.

5- Marta Swicka, ĵus vidviniĝinta juna patrino, kiu alfrontas la problemon trovi vivrimedojn por si kaj sia filineto. La romano "Marta " estis verkita de Eliza Orzeszko (1842-1910), romantika kaj progresema pola verkistino, kiu okupiĝis pri la kondiĉoj de la virino en la socio. La Esperanto-traduko, eldonita en 1910 estis farita de d-ro L.L. Zamenhof.

Bernard GOLDEN



PREMIO ONISABURO DEGUCHI

Diplomo

Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj

Per tio ĉi ni distingas vin kiel plej meritan aganton por la jaro 1997 pro via aktivado en utiligo de Esperanto kiel potenca rimedo por monda paco kaj homara feliĉo konforme al la idearo de Lazaro Ludoviko LAMARCAUD, kreinto de Esperanto, kaj la instruoj de Onisaburo DEGUCHI, kunfondinto de la Omoto-movado.

Aldone al tiu ĉi Diplomo ni donacas al vi kiel Premion la sumon de 4000 (kvar-mil) nederlandaj guldenoj por subvencii vian daŭran laboradon en la kampo, pri kiu ni mencias per aparta publikigo.

La 20-an de julio, 1997

Okaze de la 82-a Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo.



LEE Chong-Yeong
Prezidanto de
Universala Esperanto-Asocio

Okaze de la 82-a kongreso de Esperanto en Adelajdo, Universala Esperanto-Asocio aljuĝis la PREMION DEGUCHI, financata de OOMOTO, al KULTURDOMO de FRANCLANDAJ ESPERANTISTOJ, Kastelo Grésillon.

ANTAŬ 50 JAROJ

KON TIKI

TRAFLOSIS PACIFIKON

(Tiu artikolo konsistas el parto de la 1-a ĉapitro de la libro de Thor Heyerdahl, tradukita de Carsten Brymildsen, eldonita de Eldona Societo Esperanto Stockholm)

Kelkfoje oni grade kaj en tre natura maniero venas en la plej strangajn situaciojn. En tiaj okazoj oni tamen ĝenerale pli malpli frue vekiĝas kaj mire demandas sin, kiamaniere la afero komenciĝis.

Se oni ekzemple surmariĝas sur floso kun papago kaj kvin kamaradoj, estas neeviteble, ke oni iam vekiĝas iun matenon sur la maro, eble tre bone ripozinta, kaj komencas mediti.

Iun matenon mi sidis tiel, skribante en loglibro malseka pro roso: "17-an de majo. Pezaj ondoj. Bona vento. Mi hodiaŭ estas kuirsto, kaj trovis sep flugfiŝojn sur la ferdeko, cefalopodon sur la tegmento, kaj nekonatan fiŝon en dormsako..." La krajono haltis kaj la sama penso ŝtelvenis: kiel ĉi tio fakte komenciĝis ?.....

..... La afero eble komenciĝis la antaŭan vintron en muzea kontoro en Nov-Jorko. Aŭ eble ĝi komenciĝis jam antaŭ dek jaroj sur malgranda insulo en Marquesasinsularo meze en Pacifiko. Eble ni nun surbordiĝos sur la sama insulo, se la nordorienta vento ne direktos nin pli suden al Tahiti kaj la Tuamotinsularo. Image mi povis klare vidi la malgrandan insulon kun rustuĝaj, ventovipataj montoj, la verda ĝangalo, kiu inundis la deklivojn malsupren al la maro, kaj la graciaj palmoj, kiuj balanciĝis ĉe la bordo. La insulo nomiĝas Fatuhiva, kaj ne ekzistis tero inter ĝi kaj ni, kie ni nun kuŝis drivante, sed tamen ĝi estis milojn da marmejloj malproksime. Mi vidis antaŭ mi la mallarĝan Ouaivalon, kiu malfermiĝis kontraŭ la maro, kaj bone memoris, kiel ni

sidis sur la soleca bordo tie kaj rigardis ĉi tiun saman senfinan maron, vesperon post vespero. Mi tiam faris postedziĝan vojaĝon kaj ne estis inter tiaj barabaj piratoj kiel nun. Mi kolektis ĉiaspecajn bestojn kaj idolibildojn kaj aliajn restaĵojn de mortinta kulturo. Mi bone memoras iun certan vesperon. La civilizita mondo ŝajnis tiom neperceptebla malproksima kaj nereala. Ni loĝis kiel la solaj blankhaŭtaj homoj sur la insulo dum preskaŭ unu jaro kaj propravole forlasis la bonaĵojn de la civilizacio, kaj ankaŭ ĝiajn malbonaĵojn. Ni loĝis en palisa dometo, kiun ni konstruis sub la palmoj, ĉe la bordo, kaj manĝis tion, per kio regalas la tropika arbaro kaj Pacifiko.

Per severa kaj praktika lernado, ni ricevis konon pri multaj el la strangaj problemoj de Pacifiko, kaj mi opinias, ke kaj fizike kaj mense ni ofte sekvis la spurojn de la unuaj primitivaj homoj, kiuj el nekonata hejmloko atingis ĉi tiujn insulojn, kaj kies polineziaj posteuloj mem regis la insulmondon, ĝis nia propra raso venis kun la biblio en unu mano kaj pulvo kaj brando en la alia....

"Kurioze", diris Liv, "sed neniam estas tiaj ondofrapoj sur la alia flanko de la insulo." - "Ne," mi diris, "sed ĉi tiu parto estas kontraŭ la vento, la marondoj ĉiam venas sur ĉi tiun flankon." Kaj ni ree sidis admirante la maron, kiu ŝajne neniam volis ĉesi demonstri, ke jen ĝi venas, ruliĝanta de oriente, de oriente, de oriente.... Tiel la ondoj kaj la malpezaj nubaroj estis ruliĝantaj de malantaŭ la sama orienta horizonto jam de la pratempoj, La unuaj homoj, kiuj atingis ĉi tiujn insulojn bonege sciis, ke tiel estas. Birdoj kaj insektoj sciis la samon, kaj la vegetaĵaro estis tute regata de ĉi tiu cirkonstanco. Kaj ni sciis, ke tre, tre malproksime sub la orienta horizonto, kie la nuboj aperis, tie kuŝas la bordo de Sud-Ameriko. Ni aŭskultis maljunan viron, kiu duone nuda kaŭris antaŭ ni fiksrigardante en la mortantaj ardaĵojn de malgranda brulŝtiparo. " " Tiki," la maljunulo diris, "estis kaj dio kaj gentestro. Estas Tiki, kiu gvidis niajn prapatrojn al ĉi tiuj insuloj. Antaŭe ni loĝis en granda lando malproksime post la maro...." Kiam ni enlitiĝis la rakontoj de Tei Tetua pri Tiki reaperis en mia cerbo....Estis kvazaŭ la tempo ne plu ekzistus kaj Tiki kaj liaj velantaj viroj ĝuste nun surbordiĝus unuafoje. Ideo subite kaptis min: "Liv, ĉu vi

rimarkis, ke la grandegaj ŝtonfiguroj de Tiki en la ĝangalo frape similas tiajn statuegojn, kiuj postrestas de mortintaj kulturoj en Sud-Ameriko ? " Ŝajnis al mi, ke venis konfirma bruo de la ondoj. Poste ili malrapide kvietiĝis kaj mi ekdormis.

Eble tiel la tuto komenciĝis.....Mi intencis fini la studadon de bestoj kaj komenci studi primitivajn rasojn. La nesolv-

itaj misteroj de Suda maro katenis min. Ili devis esti racie solvataj, kaj mi celis identigi la mitan figuron de Tiki..... Egale senutile, kiel estas per libraj studoj kaj muzeaj vizitoj interpreti la pensojn kaj agojn de naturpopolo, egale senutile estas por vojaĝanta esploristo niatempa atingi tiujn horizontojn, kiuj trovas lokon en breto da libroj. Sciencaj verkoj, taglibroj el la tempo de la unuaj malkovroj kaj senfinaj kolektoj en la muzeoj en Eŭropo kaj Ameriko donis amason da materialo por uzado en tiu mozaikenigmo, kiun mi provis solvi. De la unua atingo al Pacifikaj insuloj de nia propra raso, post la malkovro de Ameriko, esploristoj de ĉiuj branĉoj de la scienco kolektis preskaŭ senfinan provizon da sciigoj pri la loĝantoj de Suda maro kaj ankaŭ pri la gentoj loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo. Sed oni neniam konsentis pri la deveno de ĉi tiu izola insulopopolo aŭ la kaŭzo, kial ĉi tiu tribo estas trovebla nur dise sur ĉiuj solecaj insuloj en la orienta parto de Pacifiko.

Kiam la unuaj eŭropanoj fine kuraĝis veli sur tiu plej granda el ĉiuj oceanoj, ili surprizate trovis, ke sur ĉiu unuopa insulo jam loĝis homoj, kiuj venis tien antaŭ ili, altaj homoj, kiuj renkontis ilin sur la bordo kun hundoj, porkoj kaj kokinoj. Ili parolis lingvon, kiun konis neniu alia gento. Etendiĝis kulturitaj kampoj, vilaĝoj kun temploj. Ili eĉ trovis malnovajn piramidojn, pavimitajn vojojn kaj skulptitajn ŝtonstatuojn. Kiuj estis ĉi tiuj gentoj kaj de kie ili venis ? La respondoj al ĉi tiuj enigmoj estis same multaj, kiel la verkoj, kiuj priskribis ilin....Kaj kie la scienco haltis, tie pluiris la fantazio. La misteraj gigantstatuoj el ŝtono sur Paskinsulo kaj ĉiuj aliaj kulturrestaĵoj de nekonata deveno sur ĉi tiu malgranda insulo, kiu situas tute sola meze inter la plej proksimaj insuloj kaj la bordo de Sud-Ameriko, instigis al ĉiusecaj konjektoj.... Eble iam ekzistis trans la maron terponto, kiu poste malleviĝis. Eble

Paskinsulo kaj ĉiuj aliaj insuloj de Suda maro, kiuj havas parencajn monumentojn, estas supermaraj restaĵoj de mergiĝinta kontinento ? Sed la studadoj faritaj de geologoj kaj zoologoj pravas, ke dum la tuta historio de la homaro tiuj insuloj kuŝis tute izolaj. Ni tial scias, ke la prapolinezia raso devas esti iam veninta drivante aŭ velante al ĉi tiuj apartaj insuloj laŭ aŭ kontraŭ sia propra volo, kaj verŝajne antaŭ ne tro multaj jarcentoj.....Sur marspaco kvaroble pli granda ol tuta Eŭropo, tiuj izolaj gentoj parolas dialektojn de komuna lingvo. La skribarto estis nekonata escepte de kelkaj lignaj platoj kun nekompreneblaj hieroglifoj, kiujn konservis la indiĝenoj sur Paskinsulo, sed nek ili mem nek iuj aliaj povis legi ilin. Sed ili havis lernejojn, kaj poezia historiinstruado estis ilia plej grava fako, ĉar en Polinezio historio estis identa kun religio. Ili adoris siajn praaĵojn, ili adoris siajn mortintajn estrojn malantaŭen ĝis la tempo de Tiki, kaj pri Tiki mem oni diris, ke li estis la filo de la suno.....Por helpi la memoron ili ofte uzis komplikajn sistemon de nodoj sur disbranĉigitaj ŝnuroj, kiel la inkaindianoj faris en Peruo. Oni konstatis, kalkulante la mezan vivdaŭron de polinezia generacio dudek kvin jaroj, ke Sudmaraj insuloj ne estis ekloĝataj pli frue ol proksimume 500 jarojn post Kristo. Nova kulturo kun nova vico da estroj montras, ke pli malfrua enmigrado atingis la samajn insulojn ĉirkaŭ la jaro 1100 post Kristo

De kie venis tiel malfruaj enmigradoj ? Malgraŭ sia inteligenteco kaj mirinde alta kulturo ĉiuseca tiuj maristoj kunportis certan specon de ŝtonhakiloj kaj amason da aliaj karakterizaj ŝtonepokaj iloj. Ni devas ne forgesi, ke krom kelkaj izolaj praarbaraj gentoj ne ekzistis en la jaroj 500 aŭ 1100 post Kristo kulturoj ankoraŭ vivantaj en la ŝtonepoka stadio escepte en la Nova Mondo, kie eĉ la plej altaj indianaj kulturoj estis komplete nesciaj pri la uzo de fero.

Tiel mia suspekto kaj atento transiĝis al la konataj kaj nekonataj indianoj de Ameriko. Sur la plej proksima marbordo rekte oriente, kie la sudamerika respubliko Peruo hodiaŭ etendiĝas de Pacifiko supren en la montaro, tie ne mankis postsignoj, se oni nur serĉis.. Tie ĉi nekonata raso iam vivis kaj fondis unu el la plej strangaj kulturoj en la mondo antaŭ ol ĝi subite malaperis kvazaŭ forpelita de la tera surfaco. Ili postlasis grandegajn homo-

similajn ŝtonstatuojn, kiuj memorigis pri tiuj sur Pitcairn, Marquesas kaj Paskinsulo, kaj imponajn ŝtupformajn piramidojn similajn al tiuj sur Tahiti kaj Samoa.

.....Kiam mi pluserĉis, mi en Peruo trovis surprizajn spurojn en la kulturo, la mitologio kaj la lingvo, kiuj igis min fosi daŭre pli profunden kaj pli speciale por identigi la devenlokon de la polinezia dio Tiki. Mi legis la legendojn de la inkaoj pri la sunreĝo Virakocha, kiu estis la gvidanto mem de la malaperinta blanka popolo en Peruo: "Viracocha estas inkalingva (ketchua kaj tial de nova dato. La origina nomo de la sundio Viracocha estis Kon-Tiki aŭ Ila-Tiki, kiuj signifas Sun-Tiki aŭ Fajro-Tiki. Kon-Tiki estis ĉefpastro kaj sunreĝo de la legendaj "blankaj viroj" de la inkaoj, kiuj postlasis la gigantajn ruinojn ĉe la bordo de Titicacalago. La legendo diras, ke Kon-Tiki estis atakata de gentestro nomata Cari, kiu venis de la Coquimbovalo. Dum batalo sur insulo en Titicacalago la misteraj blankaj kaj barbaj viroj estis tute venkataj, sed Kon-Tiki mem kaj liaj plej proksimaj kunuloj eskapis kaj venis poste al la marbordo, de kie ili fine malaperis okcidenten trans la maro".

Mi ne plu dubis pri tio, ke la blanka gentestro-dio Suno-Tiki, pri kiu la inkaoj pretendis, ke iliaj prapatroj forpelis lin el Peruo sur Pacifikon, estis la sama kiel la

blanka gentestro-dio Tiki, la filo de la suno, kiun la loĝantoj de ĉiuj pacifik-insuloj adoris kiel sian originan prapatron.


Sed estis aliaj postsignoj sur tuta Polinezio, kiuj indikis, ke la pacema gento de Kon-Tiki ne sukcesis solaj teni la insulojn dum longa tempo. Tiuj postsignoj indikis, ke marvelantaj militkanotoj grandaj kiel vikingaj ŝipoj kaj kunligitaj duope portis nordokcidentajn indianojn trans la maron ĝis Havaii kaj preter ĝi ĝis ĉiuj aliaj insuloj. Ili miksis sangon kun la gento de Kon-Tiki kaj alportis novan kulturon al la insularo. Ĉi tiu estis la dua ŝtonepoka popolo, kiu atingis Polinezion, sen metalo, sen ceramika arto, sen rado, teksilo kaj greno, en la jaro 1100 post Kristo.

Tiel okazis, ke mi sidis purigante rokbildojn en prapolinezia stilo inter la nordokcidentaj indianoj en Brita Kolombio, kiam la germanoj invadis Norvegujon.

Venis la paco...

Kaj iun tagon la teorio estis preta. Mi volis iri al Ameriko por prezenti ĝin.

(daŭrigota)



FABELOJ POR TRO PETOLEMAJ INFANOJ

LA STRUTO - iam Fingruleto forlasita en la arbaro semis ŝtonetojn por retrovi sian vojon, li ne konsciis, ke struto lin sekvas kaj forvoris la ŝtonetojn unu post la alia. Tiu ĉi estas la vera rakonto: jen tiele okazis: Fingruleto la ido miras: jam ne plu estas ŝtonetoj - li estas definitive misvojigita. Jam ne plu estas ŝtonetoj, jam ne plu eblas reveni; jam ne plu reveno, jam ne plu hejmo; jam ne plu hejmo; jam ne plu hejmo, jam ne plu paĉjo kaj panjo. "Tio estas lamentinda afero" li diras al si el inter la dentoj. Subite jen li aŭdas ridon, kaj poste sonorilaran brudadon kaj torentobruon, trumpetojn, ververan orkestron, ŝtormobruon (maldolĉan muzikon, strangan sed tute ne malagrablan kaj plene novan. Tiam li eligas la kapon tra inter la foliaro kaj vidas la struton, kiu dancadas, kiu lin rigardas, ĉesigas la dancadon kaj diras al li "Tiun bruon faras mi. Feliĉa mi estas. Mi havas mirindan stomakon: mi kapablas manĝi ion ajn. Ĉi-matene mi manĝis du sonorilojn kun ties batiloj. Mi manĝis du trumpetojn, tri dekduojn da ovingoj; mi manĝis salaton kune kun la salatujo; kaj la ŝtonetojn, kiujn ci semadis; ilin ĉiujn mi manĝis. Surgrimpu mian dorson. Mi tre rapide iras. Ni vojaĝos kune.

- "Sed, Fingruleto diras, miajn patron kaj patrinojn mi ne plu vidos"

- "Se ili cin forlasis, estas pro tio, ke ili ne havas la emon cin revidi antaŭ longe."

- "Ja certe kuŝas iom da vero en tio, kion ĉi diras, Sinjorino Struto.

- "Ne titolu min sinjorino; tio min suferigas ĉe la flugiloj. Diru al mi: struto, nur.

- "Jes, struto. Sed tamen, mian patron, ĉu ne?

- "Ĉu ne? Kion? Finfine ci min ektedas. Kaj cetero, ĉu mi diru al ci? Al mi ne tro plaĉas cia patrino pro sia manio ĉiam ornam ian ĉapelon per strutoplumoj.

- "Fakte tio multe kostas, sed ŝi konstante elspezas por mirigi la najbarojn.

- "Anstataŭ mirigi la najbarojn, estus pli bone, se ŝi estus zorginta pri ci. Ĉu ŝi ne cin kelkfoje survangis?

- "Ankaŭ mia patro batis min.

- "Hej! S-ro Fingruleto batis cin! Estas netolereble. La idoj ne batas siajn gepatrojn Kial la gepatroj batus siajn idojn? Krome S-ro Fingruleto ankaŭ ne estas tre sprita. La unuan fojon, kiam li vidis strutovon, ĉi vi scias, kion li diris?

- "Ne.

- "Nu, li diris: "El tio oni havos belan ovaĵon."

- "Jen, mi memoras. La unuan fojon, kiam li vidis la maron, li pripensis kelkajn sekundojn kaj diris: "Kia granda pelvo! Domaĝe, ke ne estas fundo sub ĝi." Ĉiuj ridis, sed mi sentis emon plori. Tiam mia patrino tirpincis al mi la orelojn kaj diris: "Ĉu ci ne povas ridi, kiel ĉiuj, kiam cia patro diras spritaĵon?" Pri tio ne kulpas mi, se la spritaĵoj de la plenkreskuloj ne plaĉas al mi.

- "Al mi ankaŭ ne. Surgrimpu mian dorson. Ci ne plu vidos cialajn gepatrojn, sed ci vidos landojn kaj landojn.

- "Konsentite," Fingruleto diras.

Kaj li grimpas. Kaj laŭ diabla galopmovo la birdo kaj knabeto startas, en tre dika polvonubo. Sursojle la kamparanoj balancas la kapon kaj diras: "Jen unu pli el tiuj aŭtaĉoj." La kamparaninoj aŭdas la struton kiu dumgalope sonorigas.

- "Ĉu vi aŭdas la sonorilojn? Ili diras sin krucsignante. Jen preĝejo, kiu forfuĝas. Tutcerte la Diablo ĝin postkuras." Kaj jen ĉiuj trabebaras siajn pordojn ĝis la posta mateno. Sed la postan matenon la struto kaj knabeto estas for....

SCENOJ EL LA VIVO DE LA ANTILOPOJ

En Afriko estas multe da antilopoj. Ili estas bestoj ĉarmoplenaj kaj rapidfaraj en kurado. La afrikaj enloĝantoj estas nigraj homoj, sed estas ankaŭ blankaj homoj tie. Ĉi-lastaj nur pasas. Ili venas por negoci kaj bezonas, ke la nigrujoj ilin helpu. Sed la nigrujoj preferas danci, ol konstrui vojojn aŭ fervojojn. Tio estas laboro por ili tre peniga, kiu ofte tiras morton sur ilin.

Kiam la blankuloj alvenas, la nigrujoj ofte forkuras. La blankuloj ilin kaptas per lazo kaj la nigrujoj estas devigataj konstrui la fervojon aŭ la vojon kaj la blankuloj ilin titolas libervolaj laboristoj. Rilate al ĉiuj, kiujn oni ne sukcesas kapti pro tio, ke ili estas tro malproksimaj, aŭ ke tro mallonga estas la lazo, aŭ ĉar ili tro rapide kuras, oni ilin atakas per pafilo. Jen pro

tio, foje, kuglo sur la montaro misvojigita mortigas kompatindan endormiĝintan antilopon. Tiam ĝojas la blankuloj, kaj ankaŭ la nigruloj, ĉar la nigruloj estas kutime malbone nutrataj. Ĉiuj desupras al la vilaĝo, laŭtvoĉante: "Antilopon ni estas mortigintaj", kaj ili brue muzikadas. La nigruloj batas tantamojn kaj ekbruligas grandajn fajrojn. La blankuloj rigardas ilin, dum ili dancas kaj la postan tagon ili skribas al siaj amikoj: "Okazis granda tantamado. Ĝi estis plensukcesa."

Tie supre sur la montaro, la parencaro kaj kunularo de la antilopo nenidire rigardas unu la alian. Ili sentas, ke io okazis. La suno subiras. Kaj ĉiu el la bestoj demandas al si, ne kuraĝante laŭtvoĉi por ne maltrankviligi la aliajn: "Sed kien do estos ĝi irinta? Ĝi diris, ke ĝi revenos je la naŭa por la vespermanĝo." Unu el la antilopoj, senmova sur ŝtonego,, rigardas la vilaĝon tre fore, tute malsupre en la valo. Ĝi estas tute malgranda vilaĝo, sed estas multe da lumoj, kaj kantoj, kaj krioj, ĝojfajro ĉe la homoj, la antilopo estas kompreninta. Ĝi forlasas la ŝtonegon, revenas al la aliaj kaj diras: "Ne plu penindas ĝin atendi; ni povas vespermanĝi sen ĝi."

Tiam la ceteraj antilopoj altabliĝas, sed neniu malsatas. Tio estas tre malgaja manĝo...

LA NEKONTENTA DROMEDARO - Iam estis juna dromedaro, kiu estis tute nekontenta. La antaŭan tagon li estis dirinta al siaj amikoj: "Morgaŭ mi elhejmeniĝos kun miaj gepatroj. Ni iros por aŭskulti prelegon. Jen tia estas mi." Kaj la aliaj diris: "Ho! Li estas aŭskultonta prelegon... Mirinde!" Kaj li restis sendorma la tutan nokton pro la troa senpacienco.

Kaj jen li ne estis kontenta, ĉar la prelego estis tute malsama, ol tio, kion li estis al si imaginta. Ne estis muziko kaj li estis senrevigita. Li multe enuis. Li sentis emon plori. De unu horo kaj tri kvaronoj dika sinjoro paroladis. Antaŭ la dika sinjoro kuŝis akvopoto kaj dentoglaso sen la broseto, kaj de tempo al tempo la sinjoro verŝis akvon en la glason kaj neniam purigis al si la dentojn. Kaj videble incitita li parolis pri aliaj aferoj, t.e. pri dromedaroj kaj kameloj.

La juna dromedaro pli kaj pli sentis la emon plori, iri for. Li suferis pro la varmo. Cetere la ĝibo multe ĝenis lin. Ĝi frotiĝadis kontraŭ la fotela dorsapogilo. Li tre mal-

komforte sidis, li moviĝis. Tiam la patrino diris: "Restu kviet. Lasu la sinjoron paroli" kaj ŝi pinĉis al li la ĝibon.

Ĉiun kvinan minuton la prelegisto ripetadis: "Antaŭ ĉio ne konfuzendas la kameloj kaj la dromedaroj. Mi tiras, sinjorinoj, sinjoroj kaj karaj dromedaroj, vian atenton sur tiun fakton. Kamelo havas ĝibojn po du, sed dromedaro havas nur po unu." Ĉiuj ĉeestantoj diradis: "Ho! tre interese!" Kaj la kameloj, dromedaroj, viroj, virinoj kaj knaboj skribis notojn sur siajn poŝlibretojn. Kaj la prelegisto plian fojon: "Kio diferencigas ambaŭ bestojn estas, ke dromedaro havas unu nuran ĝibon dum - jen stranga kaj utila scio - kamelo havas du."

Fine la juna dromedaro ne plu eltenis kaj impetante sur la podion mordis la prelegiston. "Kamelo!" la furioza prelegisto diris. Kaj ĉiuj en la salonego kriadis: "Kamelaĉo! Kamelaĉo! Kamelaĉo!..." Tamen li estis dromedaro, kaj li estis tre pura.

(**NOTO**): Franclingve la aŭtoro vortludas per la du signifoj de la adjektivo "sale": ĉu "malpura", ĉu egalvalora al la sufikso "aĉ".

Eltraĵo el verko de Jacques PREVERT

Tradukita de S. BONIOL

ROGER BERNARD MORTIS-

Li mortis la tagon mem de sia naŭdek-jariĝo. Membro de la Franca Esperanto-Instituto kaj de la Akademio de Esperanto, li estis konata de la esperantistaro pro siaj atentindaj tradukoj de valoraj francaj verkoj. Multaj francaj kanzonoj estas konataj en la tuta mondo dank'al lia traduk-laboro. La pli multo el ili estis kantataj la unuan fojon en la kabareto de Raymond Schwartz. Eble kelkaj atendas publikigon en iu dosiero.

Roger Bernard pluvivos ĉe la literaturamantoj kaj lia spriteco daŭre ĝojigos la vesperajn aranĝojn de kongresoj, kongresetoj aŭ simplaj renkontoj.

NIA KONKURSO

SOLVOJ DE LA ENIGMOJ

POR VIA DISTRO

1-a enigmo: ŝlosilvortoj: mane, ŝranko, malaro, mamuto, truo, taso, junio, ami, Lyon, persiko, stelo, semajno, bankroti. vorto trovota: Maltusanismo.

2-a enigmo:

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	A	U	T	O	R	I	T	A	T	O
2	V	R	O	M	A	R	K			
3	E	N	I	I	R	O	N			
4	N	E	O	L	I	T	O	M	I	
5	T	O	E	N	E	K	O	T		
6	U	N	U	O	A	R	T	O		
7	R	O	L	M	A	L	E	O	L	
8	I	U	L	A	N	O	R	O		
9	N	I	L	G	O	L	O	G		
10	O	G	I	V	O	V	O	J	O	

3-a enigmo: 1) Vivo de Zamenhof, de E. Privat

2) La rusa.

3) 1908; fondo de UEA.

4) Antverpeno 1928.

5) 1919.

6) Parnasa Gvidlibro.

7) Bulthuis.

Aŭtoro: A. de Musset. Traukinto: M. Rethel.

9) Teatra korbo.

10) la tempo-maŝino; la lando de blinduloj.

4-a enigmo: " Tion dirante Idris bategis SIAN kamelon per la vipo, kaj la aliaj sekvis LIAN ekzemplon. Dum kelka tempo oni nur aŭdis la surdajn frapojn de la dikaj vipoj KVAZAU fortajn manfrapojn, kaj la KRION: Jala!- En la sud-okcidento de la ANTAUE dubeb- blanka horizonto iĝis malhela. La varmego daŭris kaj la suno BRULIS sur la kapojn de la rajdantoj. La vulturoj evidente multe pli alten flugis, ĈAR la ombroj de ILIAJ flugiloj iĝis pli kaj pli malgrandaj, kaj fine tute malaperis." (H. Sienkiewicz -Kaptitaj en Nubio.

5-a enigmo: 1) Hispana suito; Albeniz - 2) Baudelaire - 3) L. Aubert; Habanera - 4) Ch. Bordes - 5) A. Caplet - 6) La erarinta filo - 7) Cigana sceno el Andaluzio.-

8) Atamano : kozakestro - 9) Alexandre Glazounov - 10) Saugefleurie.

6-a enigmo: 1) Geoffroy de Villehardouin - 2) Joinville, Froissart, Commines - 3) Robert Garnier; Porcie - 4) Catherine de Vivonne, markizino de Rambouillet - 5) 13-an de marto 1634 - 6) 27 - 7) Pascal.

- LA GAJNINTOJ ESTOS PERSONE INFORMITAJ -

LA VIVO EN GRESILLON

ĜENERALA KUNVENO – la 5-an de Julio 1997

La kunveno komenciĝas je la 15-30a horo. D. Babin anoncas, ke la necesa kvorumo estas atingita; la decidoj de la asembleo validos. Prezidas la kunvenon: G. Lagrange. Post transformo en donacojn de 26 akcioj, akiro de 4 novaj kaj alveno de unu plia membro, la nova kapitalo atingas 211 000 frankojn por 897 akcianoj. La agadraporto montras, ke la nombro da partoprenantoj dum la someraj staĝoj iom altiĝis.

Dum la printempa periodo de 1996 eksterlandaj infanoj venis el Svedio kaj Pollando. La granda aĝodiferenco (inter 11 kaj 17 jaroj) estigis kelkajn malfacilaĵojn. La donacoj por ebligi la venon de eksterlandaj infanoj regule alvenas. En 1996 Universala Ligo sendis sumon de 25 000 frankoj. La asembleo elkore dankas la donacintojn. La someraj staĝoj agrable kaj fruktodone disvolviĝis. Dum la lasta periodo la partopreno estis kontentiga.

La riparoj en la antaŭkuirejo, almenaŭ la unua parto, estis finitaj dum la unua periodo de julio. La asekura kompanio sendis 70 000 frankojn, kiuj kovris la tutan fakturon.. La duŝejoj de la unua etaĝo estis komplete refaritaj kaj tiuj de la dua etaĝo estis renovigitaj per malpli peza materialo. La agadraporto estas unuanime akceptita.

La financa raporto montras kreskon de la enspezoj pri restadoj kaj aliaj malpli gravaj rubrikoj. Post respondoj de la kasistino al demandoj de ĉeestantoj, la financa raporto estas unuanime akceptita, jaraj kontoj kaj bilanco.

En junio 1997, P. Babin akceptis komisionon pri sekureco, senditan de la sub-prefekto, kiu tre detale vizitis la kastelon kaj faris plurajn gravajn rimarkojn pri neko-formaĵoj. Aliaj renkontoj okazos dum la somero.

La kunveno finiĝas je la 17-a horo.

La kunven-raportisto: Guy DAIRON

KUNVENO DE LA KOMITATO – la 6-an de julio 1997

Ĉeestas D. kaj P. Babin, B. Cheverry, G. Dairon, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Metivier, P. Naulet, M. Noulon, J. Vincent. Senkulpigis: H. kaj F. Boyet, S. Bourot, Ph. Combout kaj F. Le Magadure.

S-ino Vincent proponas, ke la komitato elektu "Honora Prezidanto" P. Babin, kiu prezidis la komitaton pli ol tridek jarojn kaj daŭre helpas. La propono estas unuanime akceptita.

Dum la printempa periodo ĉeestis 43 infanoj kaj 22 plenkreskuloj el Kroatio, el Pollando kaj el Francio (Bondy kaj Tuluzo). La restado okazis en agrabla etoso kun vivaj partoprenantoj. Polaj televid-jurnalistoj filmis pri la instrumentado Freinet en Grezjono kaj pri turismaj aspektoj de la regiono. 7 lernantoj trapasis la 1-an gradan ekzamenon kaj 3 la gramatikan teston de la 2-a.

En junio 22 personoj partoprenis la restadon. En Fontevraud okazis agrabla renkonto kun gesamideanoj de la Regiono. La kursoj estis gvidataj de Marie-Joseph Berger kaj Jeannine Vincent. Multaj libroj estis aĉetitaj dum tiu periodo. Kiel jam de pluraj jaroj la aliĝoj al la aliaj someraj stud-periodoj alvenas malrapide sed regule. La kurs-gvidantoj por tiuj periodoj estos: Eva Bondar, Carla de Lorenzi, Tatiana Loskutowa, Dominique Baron, Przemek Grzybowski, Daniel Moirand, Marcel Ternant, Georges Lagrange Marie-Thérèse Lloancy kaj Juanita Turbillon. Administros: sinsekve: P. kaj L. Babin, D. kaj N. Babin, D. kaj J. Moirand.

En 1998 la Printempa Renkonto de Infanoj okazos de la 10-a ĝis la 17-a de aprilo. P. Naullet jam rilatas kun samideanoj de Rumanio, Nederlando kaj Pollando. Ŝi ricevis infan-desegnaĵojn el diversaj landoj sed intencas ĉesigi la konkurson. La ekspozicioj en diversaj urboj daŭros. La someraj staĝoj okazos de la 19-a de julio ĝis la 21-a de aŭgusto. Temoj de prelegoj estas proponitaj: Nuligo de la Nantes-Edikto (1598) kaj centan naskiĝ-datrevenon de la Franca Asocio por la disvastigo de Esperanto.⁷⁾

La komisiono pri Sekureco permesos la malfermon de Grésillon nur post necesaj specialaj laboroj. La elspezoj estos ege grandaj. Ni atendu prezo-projekton.

La proksima kunveno de la Komitato okazos la 19-an de oktobro.

La kunveno finiĝas je la 17-a horo.

La sekretario: G. Dairon.

LIBRO-SERVO

POR AUKCIO

1- La Avarulo (Molière) Eld. Hachette 1907	Baza prezo:	30 f.
2- La interrompita kanto (Orzesko)	„	20 f.
3- Lingvaj respondoj - Pariza eld. 1927	„	30 f.
4- La Rabistoj (Schiller) Pariza eld. 1928	„	30 f.
Marta (Orzesko) Pariza eld. bindita 1910	„	40 f.

Jen kelkaj sugestoj por viaj jarfinaj donacoj:

- 1) al infanoj: Kapti ŝteliston (14 f.) - Pesu elefanton (14 f.)
Asterikso kaj la Normanoj (60 f.)
- 2) al plenkreskuloj: Bagatelaro (45 f.) - Brava soldato Ŝvejk (35 f.)
La verda koro (35 f.) - Mistero minora 65 f.)
Nobela novelaro (37 f.) - Marianne (37 f.)

Ne forgesu ankaŭ la poŝtkartan kalendaron 1998 (1,50 f.)

Mendu de S-ino J. VINCENT, 26bis, rue de Milngavie FR-49150 BAUGE

NE sendu monon; atendu la fakturon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



La ADJEKTIVO ricevas KOMPLEMENTON


- I) **ADVERBA suplemento** : tro riĉa - iom stulta - horloĝe akurata
- II) **INFINITIVA suplemento** : preta ĵuri - ne kapabla plenumi laboron.
- III) **PROPOZICIA suplemento** : ĝaluzo, ke ŝi koketis al mi.
- IV) **SUBSTANTIVA suplemento** :
- 1) **AKUZATIVA suplemento** :
- parolado du horojn longa ; pakaĵo tri kilogramojn peza.
- RIM :
- tiu akuzativa suplemento staras ANTAŭ la adjektivo.
 - ĝi esprimas nur mezuron.
- 2) **PREPOZITIVA suplemento** :
- JE :
- **por anstataŭi la akuzativan suplementon** : (parolado longa JE du horo - pakaĵo peza je 3 kilogramoj).
 - **por montri abundon aŭ senigon** : (riĉa je brutoj — lama je unu membro).
 - **por esprimi ne precizan rilaton kun la adjektivo** : (kapabla je ĉio — kontenta je sia sorto).



Doris ! Mi opinias, ke ĉiutaga leciono unu horon longa estas necesa. Tiamaniere li pli rapide ĉesos rompi al ni la orelojn !



Paĉjo, cu vi estas preta pruntedoni vian monujon al Karlo ? Tra truo en sia poŝo li perdis siajn monbiletojn. Estu certa, ke li redonos ĝin morgaŭ



Kiom stulta ! Ĉu li ne estas kapabla kompreni, ke ni ne estas familieraj kun ŝuaĉoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 krono.

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frar (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 pe

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TO

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).


Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkupoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn aljn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per Interŝanĝo de Ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempli ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupo al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34